

## Beneluksa Kongreso en Charleroi

■ Yves Nevelsteen

Kia ĝojo! Post longa paŭzo pro la kovimo, okazis denove granda kongreso en Belgio: la Beneluksa Kongreso en Charleroi. Antaŭ du jaroj ĝi jam eventis en la sama loko.



La kongreso okazis en la junulargastejo de Charleroi, je promena distanco de la stacidomo. Estas rekta trajno de Antverpeno/Bruselo al Charleroi. Interalie tial ĉeestis multaj flandroj. Ni estis pli ol 65; kvanto ne evidenta, ĉar pluraj homoj sciigis al ni, ke pro la pandemio ili ne venos. Feliĉe la reguloj pri tio en la gastejo estis facilaj: oni portu buŝmaskon rondpromenante, kaj sidante rajtis ĝin depreni. Ni timis, ke povus ekesti disputoj pri tio dum la kongreso, sed tio ne okazis. La partoprenantoj respektis la opinionon unu de la alia, eĉ kiam ili foje forte mal-konsentis.

Ĵaŭde tagmeze okazis piedpromenado tra la centro de Charleroi kun deko da vidindaĵoj. Jean-Pol Sparenberg tradukis turisman broŝuron kaj aldonis praktikan mapon. Piet Glorieux gvidis paroligan rondon por la ne-ekskursemuloj.

Ĉar la buĝeto permesis tion, ni mendis pli bonkvalitajn manĝojn ol antaŭ du jaroj. Unuafoje oni proponis ankaŭ veganan manĝon. Homoj ŝajnis esti tre kontentaj.

La provizora programo aperis sur tri paĝoj en la revuo *Espéranto en marche*:

### Programo de la Beneluksa Kongreso

ni faras

#### Ĵaŭdo

11:00 (ekde) akcepto. Ni rajtas lasi valizon en la gastejo.  
12:30 tagmanĝo en la gastejo  
14:00 trankvila ekskurso en la urbo Charleroi mem. Piedpromenado tra la centro de la urbo.

Alternativa programo por ne-ekskursemuloj:

- Teknika helpo: individua helpado fare de Yves. Ekzemple: ĉapellitaj literoj, vortaroj, literumilo.

- Paroliga rondo gvidata de Piet Glorieux

18:30 vespermanĝo en la gastejo

20:00 biergustumado (Valère). Por homoj kiuj ŝatas malkovri strangajn bierojn. Ni gustumos 6 eksterordinarajn bierojn. Mi certe surprizos vin! (eta krompago)

20:00 (aŭ poste) Filmo

#### Vendredo

07:00-10:00 matenmanĝa bufedo

07:30 meditado gvidata de Jean Annet

10:00 ĝenerala asembleo de la Valona Esperanto-Asocio

10:00 laborkunsido pri la estonteco de la FEL

10:00 kurso por komencantoj fare de Fransuaz

12:30 tagmanĝo

14:00 kunsido de Belga Esperanto-Federacio

14:00 filmo por tiuj kiuj ne volas kunsidi

16:00 kantateliere kun Ankie kaj Nanne de Kajto



17:30 prezento de Fonduso Instigo fare de Yves: kiel efike finance subteni la projektojn Eventa Servo, Komputeke, esperantigo de programoj kaj retejoj ktp? [www.instigo.be](http://www.instigo.be)



ESPERANTO EN MARCHÉ - P. 10

Ni aktualigadis la programon en la retejo de Eventa Servo (<https://eventaservo.org/le/bk2021>) kaj sur du pordoj afiŝis ĝin. Kiel kutime, la programo iom ŝanĝiĝadis. Regule ni devis printi novan version; la surloka propra printilo estis tre utila.

Ĵaŭde vespere, Valère Doumont gvidis biergustumadon. Ni gustumis ses eksterordinarajn bierojn. Tre belga programero :-). Kiel alternativon ni proponis la filmon *1945*. Klaas Dijkstra subtekstigis ĝin en Esperanto.

En vendredo okazis pluraj kunsidoj:

- ĝenerala asembleo de Valona Esperanto-Asocio
- laborkunsido pri la estonteco de Flandra Esperanto-Ligo
- kunsido de Belga Esperanto-Federacio

Fransuaz gvidis kurson por komencantoj. Ĉar ŝi konstatis, ke la komencantoj reale estas komencintoj, ŝi adaptis sian kurson. Malofte plu aperas veraj komencantoj; homoj lernas la bazon de la lingvo per interreto.

Por ne-kunsidemuloj ni montris la filmon *Night on Earth (Nokto sur Tero)*. Temas pri kolekto de 5 rakontoj pri taksioŝoforoj en 5 diversaj urboj en

Usono kaj Eŭropo dum la sama vespero/nokto. Tre interesa!

Kunkantigis nin Kajto dum la kongreso. Ankie kaj Nanne organizis kantateliereon kaj vespere por ni koncertis. La repertuaro de Kajto konsistas el vigla popolmuziko, maristaj kantoj, kanonoj kaj popoldancoj. Pro la kovimo ni elektis koncertigi Kajton en la plej granda salono, la kelo de la gastejo. Tio estis malevidenta elekto, sed homoj tamen ege ĝuis.

Yves Nevelsteen prezentis sian Fonduson Instigo ([www.instigo.be](http://www.instigo.be)): kiel efike finance subteni la projektojn Eventa Servo, Komputeke, esperantigo de programoj kaj retejoj ktp? La partoprenintoj ŝajnas kompreni la gravecon de tiu fonduso, ĉar alvenis pluraj donacoj tuj post la kongreso!

Okazis kursoj por komencantoj. Alex Humet ekzercigis progresantojn, dum Piet Glorieux paroligis la aliajn.

Yves Nevelsteen prelegis pri oftaj eraroj en Esperanto, kaj prezentis sian novan projekton *Senerarigo*. Belgio estas interesa lando tiurilate: flandro facile povas ekzemple instrui en Valonio. Ĉar la nederlanda kaj la franca apartenas al aliaj lingvaj familioj, ni almenaŭ ne faras la samajn erarojn...

La kongreso estis tre muzika, fakte. Johan Van Eenoo prezentis fretocitrojn (kordinstrumentojn) kaj vespere okazis karaokeo: Jeanne Draime kaj Eric Nemes kunkantigis nin. Catherine Royaux ludis ukulelon.



Klaas Dijkstra prezentis kvizon: Kvizo sen vizo. Ĝi direktis nin al ĉiuj anguloj de la terglobo, kaj eĉ ekster tiu. Per demandoj tekstaj, aŭskultendaj kaj laŭvidaj, ni faris virtualan vojaĝon, kiu ne eblis en la lasta jaro: kien nun?

Lode Van de Velde plurfoje prezentis sian ludon *La Granda Vojaĝo*, kaj okazigis ludvesperon. Tre plaĉas tiu ludo al esperantistoj. Vi povas ĝin aĉeti de Lode por la preskaŭ-simbola prezo de 20 EUR.

Dimanĉe matene okazis neformala diskutrondo pri la kronviruso. Poste Henri De Sabates, la kreinto de



nova Assimil-ekzercaro, mallonge prezentis sian verkon.

Ni zorgis pri tio, ke la verko estis aĉetebla dum la kongreso. Vendiĝis 20 ekzempleroj! Aĉeteblas la verko en la retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo, kaj eĉ ĉe FNAC: <https://mallonge.net/hx>.

Jean Annet prelegis pri Urantio kaj pri la traduko de la Urantia libro al Esperanto. Tio estas tre granda defio; la tradukskipo taksis, ke la laboro daŭros 10 ĝis 15 jarojn!

Klaus Leith parolis pri la UEA/EEU-kampanjo pri la eŭropunia “Konferenco pri la estonteco de Eŭropo” (<https://mallonge.net/lfs>). Ĉeestis tiun prezenton pluraj estraranoj kaj aktivuloj de EEU: Seán Ó Riain, Flory Witdoeck kaj Maja Tišljar.

Dimanĉe, kvinopo ankoraŭ veturis al la arta ekspozicio “Rockerill”, kiu okazis en grandega, antaŭe industria

hangaro kaj kiu montris plej diversajn artaĵojn de diversaj artistoj. Jam ekstere logas la atenton grandega skulptaĵo en la formo de roboto, ankaŭ interne troviĝis pluraj tiaj skulptaĵoj, sed ankaŭ malpli grandaj artobjektoj, ne malpli imponaj el arta kaj teknika vidpunktoj, same kiel pentraĵoj, kungluaĵoj kaj fotoj. La ekspozicio tre bone montris kion kreemaj artistoj kapablas realigi, se ili povas disponi pri bona loko por realigi sian kreemon.

Mi kreis foto- kaj filmetoraporton pri la kongreso: <https://mallonge.net/bk2021-fotoj>.



## UEA

# Elekto de komitatanoj B de UEA

**Martin Schäffer,**  
Ĝenerala Direktoro de UEA

En 2022 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2022–2025. Parto de ĝi estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) difinas: “Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas por-

poni unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.”

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ĝis la 31-a de januaro 2022. Proponoj devas esti subskribitaj, do eblas uzi poŝton, fakson: +49 30 36428 0169 aŭ sendo de elektronike subskribita dokumento al la retpoŝtadreso: [bkomitatanoj2022@co.uea.org](mailto:bkomitatanoj2022@co.uea.org) Por faciligi la

kolekton de subtensubskriboj vi trovas formularon ĉe: <https://mallonge.net/i8>.

La uzo de formularo ne estas deviga. Eblas subteni per iu ajn subskribita dokumento.

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum la du antaŭaj jaroj (t.e. 2020 kaj 2021) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis nenium komitatkunsidon en la periodo 2016–2021, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol kvin kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos kvin komitatanojn B per reta / poŝta balotado.